Hesperornitoformaj

Hesperornitoformaj (*Hesperornithiformes*) estas formortinta kaj alte specialigita ordo de dentohavaj birdoj vivintaj en la kretaceo. Inter la hesperornitoformaj birdoj, evidente limigitaj al akvomedioj en la norda hemisfero, estis genroj kiel *Hesperornis*, *Parahesperornis*, *Baptornis*, *Enaliornis*, kaj verŝajne *Potamornis*, ĉiuj predantaj akvobirdoj. Multaj, se ne ĉiuj, specioj estis sen flugopovo. La plej granda hesperornitoforma birdo, priskribita en 1999 kaj nomata *Canadaga arctica*, eble atingis maksimuman longecon de pli ol 1,5 metroj.

Hesperornitoformaj birdoj estis, strikte dirite, la solaj dinosaŭroj koloniintaj la oceanojn; la akvoreptilioj de ilia tempo, kiel la fiŝosaŭroj kaj pleziosaŭruloj, ja **ne** estis dinosaŭroj.

Sistematiko

Hesperornitoformaj	
Troveblo de fosilioj: Kretaceo	
	
Kranio de *Hesperornis regalis*	
Biologia klasado	
Regno:	Animaloj *Animalia*
Filumo:	Ĥorduloj *Chordata*
Klaso:	Birdoj *Aves*
Subklaso:	**Hesperornithes** Fürbringer, 1888
Ordo:	**Hesperornitoformaj** *Hesperornithiformes* Sharpe 1899
Familioj	
Enaliornitedoj *Enaliornithidae* Baptornitedoj *Baptornithidae* Hesperornitedoj *Hesperornithidae*	
Sinonimoj	
Odontornithes (Marsh, 1873) (*partim*) Odontolcae (Marsh, 1875) Gaviomorphae (Cracraft, 1982) (*partim*)	
Aliaj Vikimediaj projektoj	





Kladogramo de birdoj fondita el Chiappe, 2007[1]

Notoj kaj referencoj

1. ↑ [2007] *Glorified Dinosaurs: The Origin and Early Evolution of Birds*, -a eldono. ISBN 978-0-86840-413-4.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Hesperornitoformaj&oldid=5056982"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 20:51, 12 mar. 2013.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.